BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

CGC Nº 00406 504/0001-06

SEDE PRÓPRIA
Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA
Alameda dos Maruas, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP

NOV/DEZ/1984 BOLETIM INFORMATIVO Nº 86

# ALIAJ KOMANDANTOJ EN LA BARKO

Kunfondinto de nia Organizaĵo kaj de multaj aliaj esperantistaj institucioj, veterano Nelson Pereira de Souza estas la nova "prezidanto" de BKE por la oficperiodo 1985 ĝis decembro 1987. Jen la ceteraj "komandantoj", ĉiuj elektitaj en Florianópolis-SC, la 18-an de novembro lasta: Elvira Fontes, vicprezidanto; Ludimar Azevedo da Silva, sekretario; José Carlos Dorini Ramos, kasisto reelektita kaj d-ro Paulo Vieira da Silva, estrarano pri kulturaj aferoj.

Por la kontrola komitato oni elektis s-anojn Carlos A.S. da Cunha, Eurico Antonio Ribeiro kaj Prof. Walter Francini, kiel agantajn membrojn, kaj Ingº Ivo Sanguinetti kaj Majoro Gilberto A.Silva Velho, kiel anstataŭontojn. Tamen, konsiderante ke s-ano Carlos Cunha fariĝis Honora Prezidanto de BKE, laŭ unuvoĉa decido de la asembleo, oni rajtas supozi, ke li rezignos la postenon en la kontrola komitato kaj probable anstataŭos lin Majoro Silva Velho, kiu estas pli aĝa ol Sanguigetti.

Laŭ la agadprogramo anoncita en Florianópolis de la nova Prezidanto, por aktivigi ĉiujn BKE-departementojn, la estraro nomumos helpantajn direktorojn, sen rajto voĉdoni en la estrarkunsidoj, kiuj kunlaboros en la administraj taskoj, en Brazilja. Krome, je tutnacia nivelo, estas planita plej aktiva kunlaboro de la individuaj membroj (Kategorio C), inter kiuj kelkaj fariĝos komisiitoj pri jenaj fakoj: parlamenta agado, gazetara servo, asista servo, virina agado, instruado, fakaj movadoj, centjaraj festoj, grupa lernado k.t.p.

Aliaj gravaj punktoj antaŭvidataj en la agadprogramo estas:

I – Plioftigi la kontaktojn kun la du aliaj naciaj organizoj cele al la definitiva strukturigo de NEK kaj ties plena funkciado.

II – En la kadro de NEK - konsente kun BEL kaj KKE - fari la necesajn paŝojn por la festoj de la Centjaro laŭ "Kiu faru kion".

III – Klopodadi por plifortigi la instituciojn, kiuj estas asociaj membroj (kategorioj A kaj B) per efika kunlaboro kun ili. Same ankaŭ koncerne ĉiujn lokajn grupojn.

Per konscia kunlaboro de ĉiuj maristoj de nia granda familio, ni esperas ke la barko de BKE marveturu sendanĝere kaj tuŝu trankvile ĉiujn havenojn supre anoncitajn de la ĉefkomandanto Nelson Pereira de Souza.

## BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

### Honoraj Prezidantoj

Francisco de Souza Almada (Av. Bern. de Campos, 624 Ap. 72, BR 11100-Santos-SP)

Carlos A.S.da Cunha (Alameda dos Maruás 471, BR 04068-S.Paulo-SP)

### Estraro (1985/87)

Prezidanto - Nelson Pereira de Souza (Caixa Postal 07-1182, BR 70000-Brasília-DF)

Vicprezidanto - Elvira Fontes (Caixa Postal 5.888, CEP 01000-S.Paulo-SP)

Sekretario - Ludimar Azevedo da Silva (QNL 01, Bloco E, Casa 14, BR 7200 - Taquatinga-DF)

Kasisto - José Carlos Dorini Ramos (SHIN, QI 02, Conj. 08, Casa 15, BR 71500-Brasília -DF)

Kulturaj Aferoj - Dro Paulo Vieira da Silva (MSPW 26, Conj. 08, Lote 10, BR 71700-Brasília-DF)

### Informa Bulteno

Dumonata Oficiala Organo de la Asocio
Jarabono Cr$ 4.000
Por aliaj landoj, US$ 5.00
Asociaj membroj ricevas ĝin senpage

### Ĉefredaktoro

Carlos A. S. da Cunha

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj

## DECIDOJ DE BKE-ASEMBLEO

La 18-an de novembro 1984, en la urbo Florianópolis-SC, la ĝenerala asembleo de nia Organizaĵo unuanime aprobis jenajn proponjn prezentitajn de s-ano Nelson Pereira de Souza:

PROPONO I

KONSIDERANTE:

— Iian sindediĉon al Brazila Konsilantaro de Esperanto, ekde ĝia fondiĝo;

— Iian efikan laboron por la starigo de NACIA ESPERANTO-KOMISIONO kaj por la okazigo de la 20ª Nacia Kongreso;

— Iian brilan agadon por la okazigo de la 66ª Universala Kongreso;

ni proponas, ke ĉi tiu Asembleo elektu s-anon CARLOS AUGUSTO SIQUEIRA DA CUNHA kiel Honoran Prezidanton de B.K.E.

PROPONO II

KONSIDERANTE:

— la okulfrapan progreson de la Brazila Movado en la lastaj jaroj, kio devigas la naciajn organizojn aktualigi siajn servojn kaj uzi la potencialon de la brazila esperantistaro.

NI PROPONAS:

1) ke la Estraro de B.K.E. estu rajtigita nomi Helpantojn por la Estraranoj, tiel ke ĉi tiuj povu plej efike plenumi siajn taskojn kaj efektivigi ĉiujn statutajn postulojn;
2) ke tiu Estraro ankaŭ nomu asesorajn Komisionojn por la diversaj fakoj kaj interesoj de la brazila esperantistaro.

RIMARKO: Kompreneble ĉi tiuj decidoj tute ne modifas la statutojn, laŭ kiuj la novaj kunlaborantoj ne rajtas voĉdoni en la Estrarkunsidoj (vidu Artikolon 15 pri la Delegitoj).



## KONTRIBUAJOJ POR LA BULTENO

Kiel abonkotizojn kaj mondonacojn ni danke ricevis de la subaj samideanoj:

| | | |
|---|---|---|
| Joaquim de Paula Codeço | Cr$ | 2.000 |
| Oscar Correa | Cr$ | 3.000 |
| Salvador Raymundo | Cr$ | 10.000 |
| Helena Moré | Cr$ | 2.000 |
| José Leal Ferreira | Cr$ | 6.000 |
| Cleber de Moraes Lemos | Cr$ | 2.000 |
| Manoel Moacir Sisccati | Cr$ | 4.000 |
| Manoel Borges dos Santos | Cr$ | 5.000 |
| Modesto B.de Abreu | Cr$ | 40.000 |
| José Dias Pinto | Cr$ | 40.000 |
| Nelson Ribeiro | Cr$ | 120.000 |

## KRESKAS NIA FAMILIO



Dum la lastaj monatoj de 1984 aliĝis al BKE, kiel individuaj membroj, jenaj gesamideanoj, al kiuj la estraro prezentas bonvenajn salutojn kaj plej sincerajn dankesprimojn pro la altvaloraj filiiĝoj:

Joaquim de Paula Codeço - RJ
Oscar Correa - SP
Helena Moré - SP
Prof. Paulo Vieira da Silva - DF
José Leal Ferreira - BA
Dr. Sebastião Camargo Guimarães - MG

*Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.*

# III – SUDBRAZILA ESPERANTO RENKONTIĜO

Δ Dum la periodo 16/18 de novembro lasta, en la nobla salono de la Ŝtata Instituto pri Edukado de Florianópolis-SC, okazis kun granda brilo la 3-a SER, kiun partoprenis 150 gesamideanoj el ŝtatoj São Paulo, Rio de Janeiro, Federacia Distrikto, Minas Gerais kaj ĉefe el la kunpromociantaj ŝtatoj Paraná, Santa Catarina kaj Rio Grande do Sul.

Δ BKE reprezentiĝis en la evento pere de la estraranoj, s-anoj Carlos A. Cunha, Nelson Pereira de Souza kaj José Carlos Dorini Ramos. S-ano Cunha ankaŭ reprezentis persone la landan asocion BEL kaj la verkiston Prof. Walter Francini, nome de kiuj kunportis salutmesaĝojn al la organizintoj de la Renkontiĝo.

Δ La supera juĝisto D-ro Modesto Belmonte de Abreu, UEA kaj BKE-delegito en Porto Alegre, estis la honora prezidanto de la 3-a SER kaj la ĉeestantaro multe aplaŭdis lin, pro lia emocIplena improvizita parolado.

Δ Ne povis ĉeesti persone la patrono de la Renkontiĝo, Guberniestro Espiridião Amim Helou Filho. Lia reprezentanto, Prof. Valdir Berndt, estis esperante salutata de Prof. Geraldo Mattos, kun simultanea tradukado fare de la poligloto, s-ano Paulo I. Ereno.

Δ Inter la plej gravaj esperantistoj elstariĝis s-ano Valdomiro Lorenz, filo de la karmemora Francisco Waldomiro Lorenz, pioniro en la enkonduko de Esperanto en nian landon.

Δ Neforgeseblajn momentojn de plezuro oferdonis al ĉiuj la bonega koruso de la "Associação Coral de Florianópolis", majstre gvidata de la reĝisoro José Nilo Valle. La Espero, kantata en Zamenhofa idiomo, sen nenia prozoda eraro, estis la plej belsona prezanto de la Esperanta Himno, laŭ unuanima opinio de la ĉeestantaro. Pro la aliaj kantoj, klasikaj aŭ modernaj de la repertuaro, la koruso kaj la juna reĝisoro estis longdaŭre aplaŭditaj.

Δ Dum la artaj aranĝoj, sabate vespere, tre kontentige rolis: Zélia C. da Silva, kiu deklamis poezion el la gaŭĉa folkloro; Andrea Duarte deklamis "O Navio Negreiro", de Castro Alves; Walter Quadros Martins, esperantisto kaj flamanta poeto, kantis "Florianópolis Ĉarma; Alceni Duarte kaj Ricardo Boppré bele violudis plurajn kanzonojn. Fermis la vesperarton la ĉefa ĉaro de la insula folkloro — "O Boi de Mamão", spektaklo kiu treege amuzis la publikon.

Δ Dimanĉon, matene, Pastro Bruno Ostopolski, el Argentino, por la unua fojo en la Katedralo de Florianópolis, celebris la sanktan meson parolatan en Esperanto. Kunrolis en la diservo Pastro Pedro Urbaitis, de São Paulo kaj Frato Bertino Goerner, de Porto União.

Δ Interesajn prelegojn faris dum la Renkontiĝo prof. Evaldo Pauli (Fakaj Uzoj de Esperanto); prof. Geraldo Mattos (Pri la Verbo en Esperanto); Délio Pereira de Souza (Homaranismo) kaj Ingº Ivo Sanguinetti (Sugestoj al Nomigo kaj Organizigo de la Brazila Esperanto-Movado), kies teksto fundamentis la "Sudbrazilan Rezolucion", kiu proponas la fondon de Esperanto-Federacio en Brazilo, kiel plej malfrue ĝis julio 1986.

Δ La 3-a SER finiĝis per adiaŭa tagmanĝo en agrabla restoracio ĉe la famkonata "Lagoa da Conceição", kie oni frandis bongustajn marfruktojn (Kia saŭdado!).

Δ Finfine oni gratulu la kunpromociantajn organizaĵojn el la tri plej sudaj brazilaj ŝtatoj, sed plej varme la klerajn estraranojn de Esperantista Asocio de Santa Catarina, pro la bone organizita, ĉarma kaj esperebIe fruktodona Renkontiĝo.

## Alvoko al komuna libro!

# ANTAŬ LA NOVA JARMILO

## — Ideoj por la vivo el mondo minacata —

Ni Esperantistoj, klopodante krei ponton de amikeco inter la homoj kaj helpi forigi la minacon de ĉia nekomprenemo, apartenas kaj nepre apartenu al la batalantoj por la vivo. Do, ĉi tiu libro estos nia libro.

Ĝi estas eldonata okaze de la Jubilea Jaro 1987 kaj prezentu tutmondan sumon de pensado, sentado, pritaksado kaj programado. La ĉarmo kaj ekscito de la planata libro estu en tio, ke homoj el la plej diversaj kontinentoj, landoj, kulturoj, el malsamaj situacioj, havantaj plej diferencajn religiojn, ideologiojn kaj idearojn, esprimu siajn proprajn pensojn kaj sentojn pri la supre donita temo.

"Por la vivo" ne nepre signifu nur "optimisma" La kontribuaĵoj povas tuŝi ĉiun kampon de vivo (kaj malvivo), kondiĉe ke ili koncernas la esencon de la temo. La formon ĉiu kontribuanto elektu laŭplaĉe: eseo, poemo, rakonto, satiro, sciencfikcio, programo ktp., kiel originalo aŭ traduko. Unuavice la libro estu peresperanta, ne priesperanta. Povas partopreni ĉiuaĝuloj. La unuopa teksto ampleksu ne pli ol dudek paĝojn (DIN A4 aŭ similformata leterpaperfolio). La libro reprezentu diversajn sintenojn kaj pensojn de la Unua, Dua kaj Tria Mondo - do nenia cenzuro aŭ kritiko rilate la enhavon aperos en ĝi. Principe ĉiuj kontribuaĵoj plenumantaj la ĉi tie donitajn kondiĉojn, estos aperigata: ĉar ni scias, ke la vivokampo estas vasta, ankoraŭ, sufiĉe vasta por pravigi ĉi tian ampleksan libron. Limdato laŭpoŝtstampa estas la 30-a de septembro 1986. Mallonga priskribo de la aŭtoro estu aldonita.

Respondecas pri la kompilado (al ili bv. sendi la kontribuaĵojn):

D-ro W. Gunther, Friedrich Ebert - Str. 149, D-3500 Kassel, FRGermanio, tel. 0561-14931.

Helmut Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FRGermanio, tel. 06421-25856.

Eldonas: Esperanto-Centro, Hermann Behermann, poŝtfako 1450 (Gruningerstr. 5), D-4790 Paderborn, FRGermanio, tel. 05251-17612.


# NACIA ESPERANTO-KOMISIONO

**Informas:**

**1** La unuan de januaro 1985, s-ano Nelson Pereira de Souza fariĝos la ĝenerala kunordiganto de NEK, posteno pri kiu respondecis s-ano Carlos Cunha, ĝis 31-12-84.


**2** Sub la aŭspicioj de BEL, KKE kaj BKE, kaj superrigardo de NEK, okazos en Belo Horizonte-MG, dum la periodo 17/21 de julio 1985, la 21-a Brazila Kongreso de Esperanto, laŭ akceptita invitpropono prezentita de Instituto Esperanto de Educação, kadre de la antaŭa kongreso realigita en Campinas-SP. La eventon antaŭpreparas loka organiza komitato formita de jenaj gesamideanoj:

**Prezidanto**




**Carlos Augusto Guedes**

**Vicprezidanto**



**Marcus Túlio de Almeida Flores**

**Unua Kasisto**



**Dalmo Soares Arantes**

**Dua Kasisto**




**Onézimo Costa e Farias**

**Unua Sekretario**



**Ana Lúcia dos Santos Crespo**

**Dua Sekretario**



**Alberto Luiz Minardi Chueiri**

Por la unuaj kongresaj elspezoj farotaj de tiu komitato, NEK jam anticipis la sumon de Cr$ 300.000.

**3** La nova adreso de NEK estas tiu de Brazila Konsilantaro de Esperanto en la Federacia Distrikto: Edifício Jockey Club, sala 103, Setor Comercial Sul, CEP 70300 - Brasília (DF), telef. (061) 226-1298.

**4** Ni bedaŭras, ke nur kelkaj organizaĵoj reagis al nia Cirkulero NEK-84/05, de 18-06-84. Ĝi temas pri propra programo private ellaborita de ĉiu brazila organizaĵo por festi la Jubileon, kaj ankaŭ pri la oficiala indiko de reprezentantoj por aktivi ĉe NEK kun voĉdonrajto. Viajn malfruajn reagojn bonvolu sendi nun rekte al la nova kunordiganto, en Brazilja.

# FAKTOJ KAJ FOTOJ



**Valdomiro Lorens (la filo) inter geedzoj Nelson P. Souza kaj José Carlos Dorini Ramos, okaze de la 3-a Sudbrazila E-Renkontiĝo.**



**Elvira Fontes, Maria Almada kaj Nair Cunha, dum festtagmanĝo en la sidejo de EASP, en S.Paulo (Decembro 1984).**



**En Forianópolis, Pastro Bruno Ostopolski, d-ro Modesto Belmonte de Abreu kaj ties edzino (17-11-84)**

George Otto Vaske informas:

## DM-AKIRASOCIO

Konstateblas ke, pro tempomanko, ne sufiĉaj homoj motiviĝis por patropreni la ĉijaran loton (1984). Ĝi ne povas okazi pro nesufiĉa kvanto da IRK-j ensenditaj. Ĝustatempis nur 13 geamikoj kun meznombra ensendo de po tri IRK-j ĉiu. La iniciato daŭras kaj por la venontjara loto la kaso de nun restas malferma. BV relegi la regularon en BKE-bulteno nº 83. Aŭ, ĉu vi ne riskas konfidi nur du Respond-kuponojn al la administranto?

## LASTA KOMUNIKO

**La redaktado de la venontaj numeroj de tiu ĉi Bulteno, ekde nun koncentriĝas en Brazilja, sub respondeco de la novaj BKE-estraranoj. Al ĉiuj kunlaborantoj kaj memvolaj informantoj kiuj multe helpis nin en la plenumo de nia dorna tasko, la adiaŭon kaj plej sinceran dankon de la foriranta ĉefredaktoro.**



# BRAZILAJ NOVAJOJ

## BAHIA

☐ S-ano Jaddo Couto Maciel, veterano de nia movado en Salvador, estis elektita Prezidanto de la Decida Konsilio de la Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, el Rio de Janeiro.

☐ Detalan kvinfolian raportan verkitan de Prof-ino Yvette M. Queiroz kaj tradukitan de José Saraiva Matos ni ricevis pri la Unua Regiona Renkontiĝo de Esperanto okazinta en la urbo Cruz das Almas (13/14 oktobro), kaj kies organizan komitaton prezidis la eminenta Profsoro Leopoldo Knoedt. Kompreneble, neeblas reprodukti aŭ transskribi la raporton ĉi-tie, sed nid garantias, ke la pionira evento atingis siajn ĉefajn celojn: alproksimigi disigitajn gesamideanojn kaj pli efike disvastigi la Internacian Lingvon kaj ties uzadon.

☐ La venonta samspeca renkontiĝo okazos oktobre 1985, en la bela urbo Muritiba, kie s-ano Manoel Borges dos Santos zorgos pri ĝia antaŭpreparo.

☐ La duan de decembro, kiel planite dum la supremenciita unua Renkontiĝo, gesamideanoj apartenantaj al Bahia Esperanto-Asocio, Esperanto Studgrupo "Zamenhof" kaj Societo Esperantista de Salvador kunfratiĝis en la ĉefurba pitoreskejo nomata "Parko de la Urbo", kie ili kantis, interŝanĝis spertojn, amuziĝis kaj tagmanĝis sub freŝaj ombroj de la arboj. La kunfratiĝo cêfcelis omaĝi Zamenhof en lia naskiĝmonato. Inter la organizintoj de la sukcesplena renkontiĝo estis Saraiva Matos, delegito de BKE en Salvador, laŭtenanto Pedro Ferreira de Brito, Yvette M. Queiroz kaj Aldacy de Souza Xavier.

## MATO GROSSO

☐ La VII Brazila Esperantista Junulara Kongreso (21/27 januaro 1985) en la urbo Cuiabá estos sendube la plej grava kaj impona evento kompare kun la ses antaŭaj tiaspecaj kongresoj. La aserton ni kuraĝas fari ne nur pro la efektiva apogo de registaraj instancoj al la evento, sed ankaŭ pro la lerteco, kapablo kaj dinamismo de la ĉefaj membroj de la ŝtata kongresa komitato. Iru kaj kontrolu!

## MINAS GERAIS

☐ Radio Divinópolis (R. Minas Gerais 655, 8º andar, CEP 35500-Divinópolis), pri kiu respondecas s-roj Flávio Flora kaj/aŭ Eugênio Guimarães, multe helpas la movadon en tiu urbo. En novembro kaj decembro, ekzemple, diversfoje la mikrofono de la Radio estis je dispono de s-ano Paulo R. Santos, por diskonigi la lingvon kaj propagandi la unuan ekspozicion pri Esperanto, sukcesplene de li organizitan en la Publika Biblioteko de la urbo. Alia helpanto, kiu akurate subvencias finance ĉiujn esperantistajn eventojn, estas la komercisto, s-ro Avelino Battaglini (Av. Antonio Olimpio de Morais, 349 - Divinópolis). Al la tri personoj oni amase sendu per leteroj, telegramoj, postkartoj ktp gratul - kaj dankesprimojn pro ilia kunlaboro al nia movado.

☐ Kun pli ol 30.000 radikoj, baldaŭ aperos "Granda Vortaro Portugala-Esperanto", kompilita de s-ano Allan Kardek Afonso Costa, el Belo Horizonte.

☐ Instituto Esperanto, de Belo Horizonte (Rua Guajajaras 410, s/809), festis denove la naskiĝtagon de Zamenhof per tradicia kunfratiĝa vespermanĝo. La IV JARE - Jara Renkontiĝo de Esperantistoj okazigis sian feston en restoracio ĉe la Ministerio pri Financoj.

## PARAÍBA

☐ Prof-ro Antonio Mariano Sobrino, jurdiplomito kaj licenciato pri sociaj sciencoj (Rua Severino Lucas nº 44, BR 58000 - Camalaú-PB), lanĉis sian libron, portugale verkitan, "O Esporismo no Brasil", per kiu li proponas novan vojon por la ekonomipolitika sistemo de nia lando.

☐ Per la fotoj publikigitaj de BEL-Informas, nov.84, ni konstatas, ke la estraranoj de Kunigilo Esperanto-Klubo, de Campina Grande (Caixa Postal 277, BR 58100) trovis la plej efikan metodon por diskonigi Esperanton kaj altiri pri ĝi la atenton de la ĝenerala publiko: fari eksterajn kaj bone organizitajn manifestaciojn surstrate por atentigi publikon neesperantistan.

## PARANÁ

☐ Paraná Informilo n-ro 3 anoncis, ke Esperanto fariĝos en 1985 nedeviga lernoobjekto de la Federacia Universitato de Paraná, laŭ propono de Prof-ro Geraldo Matos jam aprobita de la Departemento pri Lingvistiko.

## RIO GRANDE DO SUL

☐ Cirkulas jam inter ni la decembra numero de Suda Stelo, ekietika trimonata bulteno de la "Gaŭĉa Esperanto-Asocio (Rua dos Andradas 1137, conj. 1704, BR 90000 - Porto Alegre). Inter la legindaĵoj, ĝi publikigas preskaŭ la tutan tekston de la "Sugestoj al Nomigo kaj Organizigo de la Brazila Esperanto-Movado", ellaboritaj de s-ano Ivo Sanguinetti.

## RIO DE JANEIRO

☐ Ok personoj de bona instrunivelo vizitadis la Unuan Bazan Esperanto-Kurson realigitan de Associação Atlética Banco do Brasil - Lagoa (RJ) sub la auspicioj de BKE, kiu disdonis la 22-an de decembro, en AABB-biblioteko ateston al jenaj kursfinintoj: Jacy R. Castro, José Jorge Serpa, Ludley de Almeida, Luiz C. Sant'Anna, Maria Thereza P. Duarte, Marilena Monteiro das Neves, Martha da Silva Valladares kaj Sonia Costantin Serpa. Gvidis kaj kunordigis la kurson D-ro Jorge Soares das Neves, nia Delegito en Rio de Janeiro.

paĝô 07

☐ La supre menciita kurso reprezentas la starpunkton de la projekto "Esperanto: Plezuro plus Kulturo", elpensita de s-ano Ruy C. Albuquerque, kun la celo diskonigi Esperanton en la asocioj de Banko de Brazilo. La ambicia projekto antaŭvidas eldonon de sendependa periodaĵo (PIB-Pionira Inform-Bulteno), kies unua numero cirkulos en januaro 1985, sub respondeco de Jorge das Neves kaj Ruy Albuquerque.

☐ D-ro Joaquim do Couto, el Niterói, daŭre subtenas en la Informa Bulteno de la Grupo Francisco de Assis tre allogan kolumnon "Esperanto . . . en gutoj", per kiu li konstante montras la gravecon kaj utilon de la Zamenhofa interkomunikilo.

☐ Dum la lasta ĝenerala kunsido de BEL (oktobro 1984) oni elektis d-ron Mário Ritter Nunes kiel kunordiganton de la komitato kiu prizorgos la programon de la Ligo por la Jubilea Jaro.

☐ Inĝeniero Vicente Werneck ĉiusabate vojaĝas de Volta Redonda ĝis Valença (70 kms) por instrui E-on en kurso organizita de la Filozofia Faultato de Valença-RJ.

**SÃO PAULO**

☐ La 15-an de oktobro, kiel estrarano kaj de BEKO kaj de Sorocaba Esperanto Klubo, s-ano Bel. Eluízio Bueno Rodrigues skribe petis al la Sinjoro Sekretario pri Kulturo de'l Ŝtato la kreon de speciala komisiono pri Esperanto, por daŭre aktivi en la sfero de tiu fako, egalkondiĉe kun diversaj kulturaj komisionoj tie funkciantaj. La petskribo havas la apogon de Deputito Osiro Silveira, kiu ĝin laŭtlegis dum novembra sesio de la Leĝofara Asembleo de São Paulo.

☐ En la 25-a de novembro diplomiĝis la 5-a klaso de lernantoj preparitaj de Esperanta Grupo Adolfo Bezerra de Menezes, kun sidejo en la kvartalo Penha. Ni dankas s-anon Gentil de Lima pro la honoriga invito ĉeesti la solenaĵon.

☐ "Al la konscienco de la popoloj, monda LBV proponas Nobel-Premion por Jezuo" estas la titolo de flugfolioj alloge presitaj, kun kolora Jezua bildo, kiun senpage disdonas la Legio de Bona Volo (Av. Rudge 938, Bom Retiro, CEP 1134 - São Paulo).

☐ Prof-ino Elvira Fontes, ĵus elektita vicprezidanto de BKE, prelegis pri la Lingvo Internacia al duagradaj gelernantoj de la lernejo Major Arcy kaj al studentoj pri plastikaj artoj de la Fakultato "Marcelo Tupinambá", de São Paulo.

☐ Kiel plezuriga ero de la festprogramo por la Tago de la Internacia Lingvo (15a de decembro), Esperanto Asocio de San-Paŭlo realigis en sia sidejo tre ĉarman kunfratiĝan tagmanĝon, kie ne mankis la plej bongustaj frandaĵoj kaj diaj vinoj el Francujo kaj Portugalujo, oferdonataj de la simpatiaj geedzoj Symilde kaj Gilberto R. Ledon.

☐ S-ino Maria P. Almada daŭre ekspozicias siajn pentraĵojn en la sidejo de EASP, Rua Faustolo 124.

☐ La nova estraro de Esperanta Klubo Zamenhof, de São Miguel Paulista (Rua Idioma Esperanto 363, Vila Lilia, Caixa Postal 100, CEP 08000) invitas ĉiujn partopreni la "kunfratigan teon" realigota la 25-an de januaro, memore al la 36a datreveno de la Klubo. La programo antaŭvidas virinmodan paradon, aŭkciadon kaj suprizan artan aranĝon. Invitilo kostas Cr$ 2.000, kaj la tuta enspezo destiniĝas al plibonigo de la propra kluba sidejo.

☐ D-ro Osvaldo Pires de Holanda, Deputito Osiro Silveira kaj Prof-ro Genildo Martins Coelho estas respektive la nunaj prezidanto, vicprezidanto kaj ĝen. sekretario de la supre menciita Esperanta Klubo Zamenhof.

# CARLOS CUNHA RAPORTAS PRI SIA OFICPERIODO

**Estimataj anoj de**
**BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO**
**kunvenantaj en Ĝenerala Asembleo en la**
**urbo Florianópolis-SC, la 18-an de novembro 1984**

En nomo de la Estraro ni submetas al la alta konsidero de tiu ĉi Asembleo la raporton pri la ĝenerala situacio de BKE kaj pri nia agado dum la oficiperiodo januaro/1982 ĝis hodiaŭ. Por pli bona komprenо kaj analizo de ĉiuj faktoj kaj okazintaĵoj ligitaj al nia Organizaĵo dum la menciita periodo, tiun ĉi raporton ni prezentas laŭ jenaj ĉapitroj.

## I – MEMBRARO

Laŭ la antaŭa statuto de BKE, nur juraj personoj rajtis aparteni al la asocia kadro, ĉiam kun la privilegio nenion pagi dum la tuta tempodaŭro de la filiiĝo. Fariĝis do necese modifi la strukturon de nia anaro, ebligante la aliĝon de naturaj personoj, kontraŭ pago de modestaj jarkotizoj destinataj al la subteno de ĉiuj ordinaraj administraj kostoj. Tiun celon oni atingis per la statuta reformo aprobita en la daŭra asembleo okazinta en São Paulo, de la 31a de oktobro ĝis la 2a de novembro 1981, kiu samtempe elektis la Estraron kiun ni prezidas kaj prezidos ĝis la 31a de decembro de la kuranta jaro. Kiel vi ĉiuj vidas, ni komencis nian oficperiodon en januaro 1982 sen nenia daŭra rentofonto, krom sporadaj donacoj venantaj el bonkoraj legantoj de nia Bulteno. Tamen, danke al ĉiutaga persista varblaboro de la Estraro, la Kadro de niaj individuaj membroj evoluis de nulo al 257 aliĝintoj. Finance, tio signifas por la buĝeto de BKE en 1985 gajnon proksimuman al tri milionoj da kruzeiroj. Aliflanke, indas komentarii, ke al nia anaro ankaŭ apartenas 32 institucioj esperantistaj aŭ religiaj, entute kun pli ol 800 membroj, kio permesas al ni konkludi, ke la familio de BKE estas formita de pli ol 1.000 personoj, rekte kaj nerekte aliĝintaj!

paĝo 08

## II – EKONOMIO

Solidan ekonomian situacion prezentas hodiaŭ la Konsilantaro. Laŭ la tri lastaj ĝeneralaj bilancoj, niaj netaj havaĵoj evoluis jene:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1981 | Cr$ | 429.942 | (= | 100 kiel bazmezuro) |
| 1982 | Cr$ | 2.674.434 | (= | 622 rilate al 1981) |
| 1983 | Cr$ | 5.804.581 | (= | 1.350 rilate al 1981) |

Konsiderante la faktorojn por oficiala alĝustigo de la aktivoj, oni povas diri, ke la netaj havaĵoj de BKE atingos en tiu ĉi jarfino la admirindan sumon de 12 milionoj da kruzejroj.

## III – FINANCOJ

Treege favora estas la kuranta situacio financa de BKE, kies bilanceto en la 31a de oktobro lasta montras disponeblan saldon en bankoj pli altan ol Cr$ 800.000. Car la Asocio ne havas ŝuldojn nek kontojn pagotajn, tiuj informoj, ni kredas, estas ja komfortigaj por la homoj kiuj estros la Organizaĵon dum la venontaj jaroj.

## IV – BIBLIOTEKO

Investo de unu miliono da kruzejroj faris la Estraro por adapti pli konvene la instalaĵon necesan por ekaktivigi la bibliotekan departemento. En la momento mankas nur plenigi la montrofenestrojn kun altvaloraj verkoj, ĉu aĉeteblaj en la libromerkato, ĉu haveblaj donace tra nacia aŭ eĉ internacia kampanjo. Bedaŭrinde, ni ne plu havas tempon por preni tiun taskon.

## V – MEMBRIĜO AL UEA

La statuto reformita en 1981 (Art. 2, alineo VI "in fine") postulas, ke la Konsilantaro havu interŝanĝojn de interesoj kun esperantistaj organizaĵoj naciaj kaj internaciaj, ĉefe kun Universala Esperanto-Asocio, al kiu nepre devas aliĝi. Kun la celo oficialigi nian solidarecon al UEA kaj samtempe plenumi la supran statutan postulon, per ofico PREZI-83/39, de la 30a de maio 1983, adresita al d-ro Renato Corsetti, UEA-estrarano pri landa agado, ni submetis al decido de la Internacia Komitato la akcepton de nia Asocio en la kadro de la landaj asocioj aliĝintaj al UEA, en harmonio kun la § 13a de ties statuto. La Komitato de UEA ekzamenis la aferon dum la 68a UK en Budapesto, sed "decidis prokrasti sian decidon pri ĝi", ne fiksante limdaton por fina decido. Em la 30a de junio 1984, per letero PREZI-84/12 adresita al d-rino Flora Szabo-Felsó, ĝenerala sekretario de UEA, ni petis, ke nia filiiĝo estu denove ekzamenata de la Komitato en Vankuvero, okaze de la 69a UK en Kanado. La respondo venis post du monatoj (25-08-84), dirante: "Kara Sinjoro Cunha. Jus antaŭ mia forveturo al Vankuvero danke mi ricevis vian leteron de la 30 de junio. Kun bedaŭro mi devas informi vin, ke via peto alvenis tre malfrue por trakti ĝin en Kanado. D-ro Corsetti, la respondeca estrarano pri landa agado certe baldaŭ kontaktos vin pri la temo. Kun sinceraj salutoj - Flora Szabo-Felsó". Stranga respondo. Se en Budapesto oni "decidis ne decidi", aŭtomate, laŭ la tradicio, la afero devus esti findecidita en Kanado, sendepende de nia letero,. kiu estis vere superflua. Aldone ni informas, ke D-ro Corsetti silentas ĝis nun.

## VI – INTERNACIA KAJ ENLANDA AGADO

Koncerne la starigon de daŭra interŝanĝo de interesoj internacie kaj enlande (Art. 2, alineo VI de nia statuto), ni povas mencii kelkajn paŝojn donitajn tiudirekten. Kunlabore kun UEA, la Konsilantaro aljuĝis premion al s-ro Hilmar Ilton S. Ferreira, el Itabuna-BA, gajninto de la internacia konkurso pri kreo de simbolo pri la Jubilea Jaro. BKE, kune kun la aliaj du landaj Organizaĵoj, nerekte kontribuis por la donaco de 500 guldenoj, kiun la Nacia Esperanto-Komisiono faris al la Internacia Jubilea Fondaĵo, kiel financa kontribuaĵo de nia lando al la festprogramo de la Centjariĝo de Esperanto. Por diskonigi la brazilan movadon, al ĉiuj landaj asocioj en Sudameriko, al oficejoj de UEA en Roterdamo kaj Novjorko, al la ĉefaj esperanto-gazetoj kaj revuoj en Eŭropo kaj Azio, la Konsilantaro regule sendas sian Informan Bultenon. BKE, pere de sia Bulteno kaj kontraŭ nenia pago, sistema kunlaboras kun la eldona fako de UEA, kaj foje kun eŭropaj eldonejoj, publikigante recenzojn kaj reklamojn pri lanĉitaj aŭ lanĉotaj verkoj kies disvendado en la mondo implicas komercan interezon, sed ne por ni, komprenéble. Rilate al enlanda agado, estus teda tasko mencii ĉiujn paŝojn donitajn por la vigligo de la brazila Esperanto-movado. Konvenas tamen mencii la ĉefajn, tiujn kun tutlanda resonado kiel, ekzemple, la kongresojn de BKE en Brazilja kaj Recife (1982/1983); la starigon de Esperanta Sekcio en la biblioteko de la Federacia Deputitara Ĉambro (1982); la oficialan pioniran viziton de esperantistoj al la Supera Justica Federacia Tribunalo (1982); la administran kunordigadon de la Nacia Esperanto-Komisiano (1982/84), kiu patronis la brilan 20-an Brazila Kongreso de Esperanto en Campinas, majstre organizita de Esperanto-Asocio de San Paŭlo (1984), kaj finfine la senkondiĉan apogon al la ambicia projekto nomita "Esperanto: Plezuro plus Kulturo", per kiu s-anoj Ruy C. Albuquerque kaj nia delegito en Rio, d-ro Jorge Soares das Neves, planas la enkondukon de la Internacia Lingvo en ĉiun "Associação Atlética Banco do Brasil" dissemitan en la tuta lando.

## VII – INFORMA BULTENO

Nia dumonata oficiala organo, konsiderata de multaj kiel la plej bona kaj akurata informilo eldonata en Sudameriko, kompletigis en julio 1984 sian dekan datrevenon de seninterrompa cirkulado, fakto kiu estas rara en la vivo de esperantaj periodaĵoj. Dum la finiĝanta oficperiodo aperis 19 numeroj (74 ĝis la numero 85), kaj ankaŭ aperos sub nia respondeco la numero 86, kiu rilatos al la du lastaj monatoj de tiu ĉi jaro. Pro la alta eldonkosto de la Bulteno (la antaŭlasta eldonaĵo - numero 84 - kostis Cr$ 186.960), kelkfoje ni estis devigitaj redukti la nombron de paĝoj, kiel okazis kun la numeroj 83 kaj 85. Ordinare, tamen, la Bulteno cirkulas kun 8 paĝoj, multaj kliŝoj kaj ĉiu eldonaĵo estas de 700 ekzempleroj. La regula cirkulado de nia informilo ŝuldiĝas grandparte al la financa subteno de legantoj kaj asociaj membroj, al kiuj la Estraro esprimas sian profundan dankemon.

## VII – LASTAJ VORTOJ

Submtetante al la nuna Asembleo la dokumentaron kaj ĝeneralan bilancon rilatai al 1983, ni finas tiun ĉi mallongan raporton pri la sanstato de BKE kaj pri nia agado dum la jartrio 1982/84. Pliajn paŝojn krom la menciitajn la Estraro ne sukcesis doni, pro manko de rimedoj, homfortoj kaj libertempo. Malgraŭ ĉio, ni fieras pro la kreskanta progreso de la Asocio kaj pro la respekto kiun ĝi inspiras enlande kaj internacie.

Florianópolis-SC, la 18an de novembro 1984

Carlos A.S.Cunha - Prezidanto